

[noto] fonto: "Informilo de JBLE", n-ro 100, jaro ?
reaperis sur "budhana kuriero", n-ro 12, 1963 / n-ro 13, 1964

Konciza Historio de Budhana Esperanto-Movado en Japanio

trad. Asano Sanĉi

Antaŭparolo

Tiu ĉi artikolo estis antaŭe verkita de Ven. Zenkei Ŝibajama, estante ĉef-episkopo de Nanzen-ĝi, kaj jam aperigita sur "The International Buddhist Bulletin" vol. I, n-ro 1-3 en 1935. Sed la revuo traktis plejparte anglan kaj japanan lingvan artikolon. Konsekvence la legantoj estis limigitaj en speciala grupo. Tial ni denove nun aperigas ĝin tie ĉi.

1

Por skizi la temon estas oportune, ke oni unue priskribu pri jenaj grupoj, kiuj aperis unu post la alia en budhana kampo komence de la movado.

A) Ootani Daigaku (= Universitato) Esperanto grupo.

Ĝi fondiĝis en novembro de 1921 laŭ la iniciato de unu el estraranoj de la Universitato, s-ro K. Hosokaŭa¹ kun ĉirkaŭ 20 grupanoj, kiuj ĵus finis elementan kurson, okazigitan en la Universitato por unua fojo. Kaj en februaro de sekvinta jaro 1922 jam ĝi eldonis sian organon "La Paco", la unuan n-ron. Vere la fondiĝo de la grupo kaj la eldono de la organo estas la unua en Esp-movado de la kampo.

Kvankam la grupo marŝadis sur onduma vojo iam prospera kaj iam ne tiel vigla, ĝi bone funkciadis ĝis la komenco de 1926, ĉirkaŭ 5 jarojn, laŭ la persista klopodo de bravaj grupanoj, el kiuj s-ro K. Tanijama², s-ro R. Ikeura estas fame konataj.

"La Paco", kopia enhavoriĉa grandforma organo de la grupo, dume sinsekve aperis ĝis la 10a de novembro. Tiutempe la grupanoj ĉiam redaktadis la organon kun revo, ke ĝi havas grandan mision diskonigi Mahajanan Budhismon de sunoleviĝanta lando al ĉiu mondparto. Kaj la revo ne tute estis vana. Ĝi gajnis sufiĉe da reutacio el ĉiu angulo de la mondo malĝraŭ tio, ke la stiloj de ĝiaj artikoloj ne estis tiel bone rafinitaj komparante kun tiuj de nuntempaj grupoj de multaj grupoj.

¹ 細川憲寿

² 谷山弘蔵

Bedaŭrinde, kun elgradiĝo de supre nomitaj samideanoj, t.e. de aprilo de 1926, la grupo havanta brilantan historion en la movado, dormis dum pluraj jaroj, postlasinte grandan monumenton, 10 numeroj da organoj famekonataj.

B) Rjukoku Daigaku Esp-movado

Ĝi fondiĝis en majo de 1922, tuj post fondiĝo de la unua kurso okazigita en la Universitato. De tiam oni aranĝis ĉiujare kurson por akiri novajn samideanojn. Kaj la grupo tiel same kreskis ke ĝi fine povis eldoni kopie sian organon, titolitan “Sankta Tilio”, en oktobro de 1925. Ĝia ĉefredaktoro estis s-ro Ŝ. Inada³, poste Ŝ. Sanada, el Nara-ken, kiu entuziasme gvidadis la grupon ĝis sia elgradiĝo, ĝis marto de 1929.

Okaze de la festo de inaŭguracia datreveno de la Universitato, celebrita en printempo de 1925, la grupanoj aranĝis bonan Esp-ekspozicion, kiu havis grandan sensacion kaj brilantan frukton.

La sorto de la grupo estis tiamaniere dorlotita kaj la organo n-ro n post n-ro aperis ĝis la 6a, kiu eldoniĝis en marto de 1929. Tamen ankaŭ venis malfavora tago por la grupo, de aprilo de 1929 ĝi ne bone funkciis pro malmultiĝo de grupanoj. “Sankta Tilio”, kopia organo, kalkuliĝas ĝis la 6a n-ro, tamen ankaŭ estas memorinda produktaĵo de budhana Esp-movado en la unuaj tagoj.

C) Nippon Esperanto-Gakuin

Ĝi fondiĝis en decembro de 1922. Ĝia fondinto kaj direktoro estis s-ro B. Akijama⁴. En septembro de 1922, s-ro B. Akijama aranĝis ĉe Ĵoogu-Kjookai, Hongo-Ku, Tokio, kulturen liberlekcian, kiu konsistis el religia, sociala kaj naturscienca fakoj. Okaze de la aranĝo li prove intermetis Esperantan fakon, kiun gvidis Prof. Ĵ. Kaŭahara, fame konata samideano. Al nia miro, tamen, enskribintoj de la fako kalkuliĝis pli ol 30 personoj. Jen, li ĝojanta pro la sukceso sendepende apartigis la fakon de la lekcio kaj nove fondis supre titolitan Esp-Gakuin.

De la fondiĝo li energie, sammaniere laboradis por propagandi Esperanton, sinsekve okazigante bone aranĝitajn kursojn pli altajn kaj elementajn. Ĝis aŭgusto de 1924, li aranĝis plurajn kursojn, al kiuj partoprenis multaj personoj. Sed favora sorto ne daŭris longe. Li iom lacigita pro trouzo de la forto, fermis poron de la Esp-Gakuin kun granda bedaŭro, postlasinte historian gloron en la kampo de la movado.

Estas notinde, ke dum vigla funkciado de la Esp-Gakin preskaŭ ĉiuj rektoroj de ekleziaj universitatoj kaj eminentaj kleruloj koncernantaj al eklezioj en Tokio ne ŝparis siajn favorojn al la movado. Inter ili oni povas nomi la jenajn: Suehiro-Ŝookei, Miĉizuki-Seikjo, Sakaino-Koojoo, Umata-Gjookei, kaj el ili kelkaj ricevis lecionon aŭ apartenis al

³ 稲田（真田）昇連

⁴ 秋山文陽

speciala lekciaro por kursanoj, kiu estis grandskale aranĝita en la okazo de la 4a kurso ĉe Centra Budhisma Asocio.

Ĉ) Esperanta Fakoj de Budhismo Sav-Armeo

Ĝi fondiĝis en januaro de 1925 en libera religia institucio Sav-Armeo (B.S.A.), laŭ la iniciato de s-ro J. Nakaniŝi⁵ kaj s-ro R. Tojoŝima⁶. Ĉe la fino de 1924, s-ro J. Nakaniŝi konvinke klarigis pri neceseco kaj indo de Esp.-movado al s-ro R. Tojoŝima, kiu esis ĉefo de propaganda fakoj de B.S.A. kaj instigis pri tio, ke B.S.A. nepre havu Esp.-fakojn, por ke ĝi plenumu ian rolon por la movado. Jen, tial komence de sekvinta jaro fondiĝis la fakoj. De tiam s-ro Nakaniŝi, la direktoro de la fakoj, unu post alia gvidadis kursojn en Jaŭata, sidurbo de centro de B.S.A.

En aprilo de la sama jaro, li eldonis kopian gazeteton malgrandforman por propagandi Esp-on; sekve ĝia enhavo plejparte estis prelego de elementa kurso aŭ japanlingvaj artikoloj por neesperantisto. Ĝi ĉiumonate aperadis ĝis la 5a n-ro.

En oktobro de la sama jaro, anstataŭ la kopia gazeto eldoniĝis nova titolita “La Lumo Senbara” en preso kun preskaŭ sama enhavo. Tiu ĉi gazeto estas la unuafoje aperinta en preso en Japana Budhana Esp-movado. En tiu vidpunkto ĝi estas tre memorinda.

“La Lumo Senbara” ĉiumonate regule aperadis ĝis la 9a n-ro (ĝis junio de 1926) en ekonomia subteno de s-ro R. Tojoŝima, Sed je nia bedaŭro, de sekvinta n-ro, la 10a, ĝia enhavo tute ŝanĝiĝis kaj fariĝis populara religia gazeto, ĉar oni ne plu povis ricevi ekonomian subtenon por daŭrigi la eldonon.

Ankoraŭ estas alia notindaĵo. Laŭ la propono de s-ro Nakaniŝi blida samideano s-ro J. Ueda, ĉefo de blinda fakoj de B.S.A. bonvolis akcepti Esp-lekciojn sur la organo de la fakoj. Kaj de aprila n-ro de 1926, artikolo de Esp-kurso de s-ro Nakaniŝi daŭre redaktiĝis en la organo punktlitera.

Laŭ la skizoj de la supre cititaj grupoj oni certe povas scii ĝi historieton de komenca epoko de Budhana Esp-movado.

Resume, Esp-movado en Budhana kampo ekĝermis en 1921. Kaj jaron post jaro pliprosperiĝadis ĝis 1926. Poste de 1927 ĝis 1929 iom post iom malvigliĝadis.

Sed en 1930 ekaperis orienta ruĝo al la movado. Pri tio mi volas skizi en sekvonta ĉapitro, kiu aperos en la proksima n-ro de tiu ĉi gazeto.

Estas senbezono diri, ke krom la supre skizitaj movadoj stis ankaŭ etaj personaj agadoj, kiujn mi intence preterlasis menciigi pro tio, ke ili ne estis tiel gravaj.

⁵ 中西義雄

⁶ 豊島竜象?

Estas kompreneble, ke la prospero kaj malprospero de la Esp-movado ankaŭ devas havi gravan rilaton kun la tiama tendenco sociala kaj historia, sed pri tio mi ne volas menci ion ĉi tie. Mi tamen esperas, ke la karaj gelegantoj mem pririgardu la flankon. Jen, mi daŭrigos la simplan skizon de la temo.

Ree venis favora tago en 1930 por la movado, kiu restis ne tre vigla dum du tri jaroj. En februaro, s-ro Nakaniŝi, ĉefdirektoro de Esp-fako de B.S.A., eldonis la 1-an n-ron de persona budhisma revueto hektografita, titolita "La Libero". La revueto daŭre aperadis ĝis 1935; jam aperis entute 15 n-roj.

En junio, el Bukka-ŝa, Kioto, eldoniĝis "La Dek Bildoj de Bovpaŝtado", libreto apartenanta al la Zen-budhismo, ĉar la ĉefdirektoro de Bukka-ŝa, societo de ĝia movado por la budhana junularo, havis grandan favoron al la Esp-movado. Kvakam la libro estas ne tiel granda, ĝi estas la unua budhisma libro apart-volume eldonita en Esperanto.

En la sama monato oni okazigis "La Unuan Konferencon de tut-pacifikaj junulaj budhanaj asocioj" en Havajo. Kaj ĉe tiu okazo la konferenco akceptis proponon prezentitan de japanaj delegitoj laŭ la fervoraj subtenoj kaj konvinkigaj klarigoj de s-ro Kotani, ĵurnalisto de Ĉugai-nippo, s-ro Ogata, ĉefdifrektro de Bukka-ŝa: "Enkonduku ankaŭ Esperanton en la movado de gejunulaj budhanaj asocioj." Tio ja estas la unuafoja akcepto de Esperanto en oficiala budhana konferenco. La akcepto alportis preskaŭ nenian frukton de post tiam, tio tamen ja estas sufiĉe grava kaj notinda afero en la movado de budhana kampo.

En decembro, s-ro Ŝibajama ricevis de s-ro G. H. Yoxon, angla budhana samideano, leteron, ke li volas starigi internacian organizaĵon por tutmondaj budhanaj samideanoj kaj ĝian organon, kaj ke pro tio li volas peti helpon de li kaj de aliaj japanaj samreligianoj. La ricevinto kaj liaj kolegoj estis tiel instigitaj, ke ili komencis pripensi, ke japanaj budhanoj, kiuj sin nomas landanoj de la mahajana budhismo, ankaŭ devas aktive eklabori por la movado.

En sekvinta jaro 1931, pli favora stato regis la movadon. Ĉe la fino de januaro s-ro Ŝibajama ricevis de s-ro G. H. Yoxon leteron, ke li fífine plenumis sian projekton starigi "Budhanan Ligon Esperantistan". Kaj kun la letero li ricevis la 1-an n-ron de kvaronjara bulteno de B.L.E. Kompreneble la fakto forte frapis la korojn de budhanaj esp-istoj en nia lando, el kiuj unu eĉ publikigis artikolojn pri B.L.E. kaj pri s-ro G. H. Yoxon en la ĵurnalo Ĉugai-nippo, kompetenta ĵurnalo en budhana kampo.

En februaro du usonaj budhanaj samideanoj alveturis Japanion kaj restadis en unu el la ĉeftemploj de la Zen-sekto en Kioto, Daitoku-ĵi, por studi Zen-budhismon. Dum ilia restado ĉirkaŭ dionjara, kiotaj samideanoj multfoje interkomunikiĝis nur per Esperanto kun ili. Tio ankaŭ helpis vigligi nian movadon.

La 2-an de majo vespere, okazis kunveno por starigi budhanan grupon, kies aranĝantoj estis s-roj Dazai, Inada, Monobe, Ŝibajama. Ĉirkaŭ 10 partoprenantoj, inter kiuj estis eĉ veteranaj pioniroj, s-ro Akijama kaj s-ro Hosokaŭa. Post amika interkonsiliĝo oni decidis: “Ĉiuj partoprenantoj, provizore organizu ‘Japanan Budhanan Ligon Esperantistan’ kaj kunlaboru por plipotencigi ĝin, alvokante al ĉiuj budhanaj samideanoj tra la lando.” Tamen la aranĝantoj komence nur sciis, ke ili almenaŭ havas novan grupon por budhanaj samideanoj en Kioto. Tiel JBLE favore ekpaŝis sian nuan paŝon.

La 17-18an de la sama monato, sub la aŭspicio de Takakra Budhana Junula Asocio oni aranĝis Esperanto-ekspozicion, kaj la 18an-27an oni aranĝis elementan kurson, al kiu enskribiĝis pli ol 50 gekursanoj, kiuj estis gvidataj en tri klasoj. Tiam grandan sukceson la aranĝantoj eĉ ne supozis. Tuj post la kurso fondiĝis Takakura Esperanto-grupo. La kurso kaj la grupo multe efikis por revigligi nian movadon en Kioto, ĉar inter kursanoj troviĝis multaj studentoj de ekleziaj fakultatoj, t.e. tuj post finiĝo de la kurso revigligiĝis la Esp-grupo de Ootani-Daigaku, tiu de Rjukoku-Daigaku kaj fondiĝis tiu de Rinzaï-ŝu Daigaku.

En julio oni kopie aperigis “Informilon de JBLE”, n-ro 1, kun nomaro de la subtenantoj. Kaj ĝi aperadis ĉiumonate ĝis novembro.

La 15an de oktobro, kaptante bonŝancon de la 19a Kongreso de tutjapana Esperantistaro en Kioto, lokaj budhanaj samideanoj aranĝis kunsidon de budhana esperantistaro. Kaj ĝi ankaŭ samtempe estis inaŭguracio oficialigi la fondiĝon de JBLE. Ĉirkaŭ 40 partoprenantoj venis el diversaj landpartoj. La ejo estis la luksa halo de la Budhisma Muzeo por geknaboj en la Marujama parko. Post formala programo oni harmonie interkonsilis tutan regularon por JBLE kaj decidis eldoni kvaronjaran organon, kies titolo “La Lumo Orienta” ankaŭ samtempe estis decidita. Jen, JBLE oficiale komencis marŝi ne per grandaj, sed per fortaj paŝoj. Post du tagoj, la 17an, la dua kongrestago, oni havis budhisman fak-kunsidon kun pli ol 15 personoj la unuan fojon en kiu oni decidis plurajn aferojn por nia movado.

Komence de novembro, en la nomo de la faka kunsido kaj JBLE oni dissendis skribaĵojn por instigi la enkondukon de nia lingvo al ĉiuj institutoj, lernejoj kaj fakultatoj, kiuj koncernas al eklezioj.

De 1932 ĝis 1934, dum tri jaroj, nia movado en budhana kampo restis preskaŭ samstata, t.e. ne tre viglis. Ĉu tio estis kaŭzata de sociala aŭ nacia tendenco, aŭ ĉu la kaŭzo estis la nepenemo de la tiamaj samideanoj, mi ne povas facile aserti. Tamen mi povas citi kelkajn de la kaŭzoj.

JBLE daŭre funkciadas ĝis hodiaŭ regule eldonante sian organon, kaj dum 1933 ĝi eldonis 40 paĝan libreton “La Samanta-Mukha Parivarto”⁷.

⁷ 法華經普門品

En aprilo 1933, s-ro Takeuĉi persone eldonis 50 paĝan llibreton "Budao", tradukaĵon de la unua ĉapitro de la fama verko "The Essence of Buddhism", verkita de prof. Lakŝmi Narasu.

En marto 1934, samtempe aperis du organoj: el Rjukoku Daigaku Esp-grupo "La Sankta Tilio" n-ro 7; el Rinzai-ŝu Daigaku Esp-grupo "La Voĉo" n-ro 1.

En julio 1934, la 7a konferenco de la tut-pacifikaj junulaj budhanaj asocioj, kiu havis lokon en Tokio, aĉceptis Esperanton kiel preskaŭ oficialana lingvon.

En septembro 1934, "La Paco" n-ro 11 aperis en preso el Ootani Daigaku Esp-grupo. Post okjara dormado fine vekigis "La Paco", kiu havis gloran historion en siaj pasintaj jaroj.

Tie ĉi finiĝas la artikolo de Ven. Ŝibajama. Ĉi-sube mi aldonos iomon pri la postmilitaj aferoj, kiel vekigis la Ligo post la mondmilito, kaj kiel la movado daŭris ĝis hodiaŭ.